

PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptoj oni ne resendadas.

ESTU BONVENANTAJ AL NI!

Preskau kvar jaroj forpasis de la momento, kiam la ĉeĥaj esperantistoj kunvenis por decidi la eldonadon de ilia organo »La Progreso«. Ĝi estis en la tempo de furiozanta mondmilito, kiam la landoj de tiama monarkio Aŭstria-Hungaria estis fermita kaj kiam la tasko per si mem ne estis facila, ĉar tiam multaj resp. gazetoj malaperis kaj ĉefe ĉiuj en la monarkio. La tasko eldonadi novan peranton de diversloke dissemitaj esperantistoj estis komisiita al ni esperantistoj en Plzeň kaj ni, komprenante la gravecon de la afero, entuziasme komencis nian laboron en la espero, ke ni sukcesos. Kaj nia penado estis gvidata en du direktoj: nacie, per la helpo de la internacia lingvo Esperanto diri al la mondo, kion ni Ĉeĥoslovakoj bezonas, kaj internacie prilabori la kampon de Esperanto, tiutempe en nia lando dezertan.

En la unua direkto ni, kaj nia tuta nacio venkis kaj nia lando kune kun frataj Moravio, Silezio kaj Slovakio formas nun unu ŝtaton tute liberan, kio nin ĝojas nedireble.

En la dua direkto, ni ankaŭ bone fosas nian sulkon, kion interalie pruvas Via ĉeesto ĉe tiu ĉi nia XIII. Universala kongreso, kiun Vi

partoprenas en tia nombro, eĉ el la plej malproksimaj landoj, ke ĝi fariĝis la plej grandioza manifestacio esperantista. Tiu ĉi fakto ĝojas niajn korojn, ni ĝojas kun Vi nepriskribeble kaj ni petas Vin, niaj amataj gastoj, senti Vin en nia ŝtato hejme. Estu feliĉaj kaj kontentaj sur nia libera teritorio kie valoras la devizo: Gasto en domo — dio en domo. Sole Via kontenteco en nia ŝtato povas rekompenci niajn klopodojn kaj ĝi samtempe estos por ni gvidilo sur la elektita vojo. Egale kiel Vi, ni ne ĉesos nian laboron, ĝis kiam ni vidos la homaron liberigita tiagrade, ke ĉesos la subpremado de unu nacio per alia, ĝis kiam la homaro estos kunigita per la grandioza ideo de nia nobla Majstro Zamenhof.

Laborante en plena harmonio kun Vi, ni estas certaj, ke jam baldaŭ ni venos al la celo: fratigi la homaron per helpo de nia internacia Esperanto.

Kaj tial ankoraŭ unufoje al Vi ĉiuj:

ESTU AL NI BONVENANTAJ!

Por la eldonantaro, redakcio kaj administracio de »La Progreso«

Fr. Kavan.

Aŭg. Pitlík:


KONGRESURBO PRAHA.

Delongtempa revo de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj realiĝis: La XIII. universala kongreso de Esperanto okazas en Praha.

Ne estas hazardo, ke la eminentularo esperantista elektis Praha-n kiel kongresurbon, ke la unua granda kongreso postmilita kunvenas en la renovigita Ĉeĥoslovakio, ĝi estas simpla rezultato parte de la longjara persistema propagando de Zamenhofa lingvo en la Ĉeĥoslovakaj landoj, parte de la fervora peresperanta diskonigo de la naturaj belaĵoj de Praha kaj de la kultura celado de la ĉeĥa nacio.

La Ĉeĥoj, filoj de malgranda historia nacio, inter la unuaj ekkomprenis la potencon de la interna ideo de esperanto

kaj ne atendante kiam la fremdlando komencos interesiĝi pri ilia lingvo kaj multvalora malnova kulturo, kiu donis al Eŭropo virojn kiel ekz. instruiston de nacioj Comenius, reformatoron Hus kaj aliajn, tuj fariĝis nelacigemaj propagandistoj de Esperanto, kiu devis ilin helpi transpaŝi la limojn kaj enpenetri en la korojn de la membroj de plej diversaj kaj plej malproksimaj nacioj. Hodiaŭ preskau ne ekzistas ĉeĥa vilaĝo, kie la instruisto aŭ alia persono ne estus esperantisto, kaj neniuj ŝtato havas tiom da bone parolantaj esperantistoj kiel Ĉeĥoslovakio, kie la centraj ŝtataj oficoj tre subtenas la esp. movadon.

LA KONGRES-
URBO PRAHA.TEATRO DE
VINOHRADY.LA KONGRES-
URBO PRAHA.LANDA
MUZEO.

La urbo mem pro sia natŭra situacio kaj historio meritas fariĝi »ĉefurbo de Esperantujo«. Estante elkonstruita sur ses montetoj kaj kantlaŭdita de Chateaubriand, Goethe, Humboldt, Marcel Prevost, Georges Brandes, Louis Leger, William Ritter kaj aliaj, ĝi estas laŭ eldiro de plej eminentaj vojaĝistoj la kvara plej bela urbo Eŭropa.

Praha, kultura centro de Ĉeĥoslovakio, por fremduloj estas muzeo de l'mezepokaj arkitekturo kaj antikvaĵoj, kie ofte naskiĝis kaj finiĝis gravaj historiaj okazintaĵoj, kiuj multfoje donis karakteron al la historio de la tuta Eŭropo. Firenze estas eleganta kaj subtila kiel desegnaĵo de Botticelli, Venezia grandioza kaj volupta kiel bildo de Tican, Paris estas ĉarma kaj plaĉas al fremduloj, ĉar tie ĉio spiras per ridema agrableco kaj deziro

ravi, Wien estas gaja kaj petola kiel opereto de Offenbach, Moskva kun siaj pentrindaj kaj unuformaj kupoloj estas hierarkia, — Praha estas tragedia, ĉiu ŝtono tie rememorigas nin pri heroo dramo. Nenie estis la vivo pli agitata, la revolucio pli uragana, la pasioj pli sovaĝaj, la bataloj pli furiozaj. Ankaŭ nenie aliloke estis la intereso pli gravaj kaj nenie alportis la venko al la kontraŭuloj sekvojn pli plendindajn.

Do la ambaŭ kondiĉojn, kiuj decidas pri la okazigo de la universala kongreso Praha plenumas: estante centro de tre vigla esperantista kaj historia atrakcio unuaranga.

La XIII. en Praha plenumu ĉiuj dezirojn de la esperantista mondo, ĝi fariĝu epoko grava en la tutmonda esperantista movado!

NUR ANTAŬEN!

Esperantista marŝo dediĉita al la XIII. Esperantista Kongreso. - Komponita de Jos. Horák, Plzeň,
al la vortoj de 7/8 Dro. St. Schulhof, Pardubice

Tempo di marcia.

Nur an-tau-en. nur an-tau-en tra la ma-roj, tra la lan-do. Mal-graŭ
 Nur an-tau-en. nur an-tau-en tra la nok-to, trans la ba-ro, en la
 Nur an-tau-en. nur an-tau-en ni-aj bra-vaj pi-o- ni-roj, an-kau
 Nur an-tau-en. nur an-tau-en, kiu kon-fi-da, ga-ja kan-to: jam fi-

ĉi-o for-to, a-go, ri-do kaj fa mo-ka-ta-jo, i-ru-
 se bon kaj vi-la, ĝon ni kol-por tu la no-va- jon, ki-un
 ni- ĝas pap-to mi-mo, mal-a-pe-tas jam la ŝi- do nin for-
 per la

poco a poco crescendo.

ni-a pro-pa-gan-do Jam pro-spe-ros ni-a sta-to vi-vos kreskos
 ĝu-os la i-da-ro Bal-dau, bal-dau la stan-dar-do flit-tos ga-je
 la-sos sen so-pi-roj. For pro-kras-to e-fe-me-rat Nur-per-fi-da
 tuŝ de Es-pe-ran-to. Kun Es-pe-ro en la ko-ro kun la ste-lo

flo-ros ĉi-o, se en bo-na har-mo-ni-o a-pud fra-to mar-ŝos fra-to.
 en la nu-bo, se ku-ra-ĝe kaj sen du-bo mar-ŝos ni-a a-van-gar-do.
 re-ne-ga-ĉi, re-for-me-ma a-pos-ta-to, ĉi-am ĝe-mas seu-es-pe-ra,
 sur stan-dar-do, mar-ŝu ni-a a-van-gar-da, nur an-tau-en por la glo-ri!

Rimarko. Komponisto de tiu ĉi marŝkanto estas nia vigla samideano so. Jos. Horák, muzikestro de la 18. ĉs. regimento en Plzeň, komponisto de multaj muzikverkoj. Ĉi tiun marŝkanton ni samtempe eldonas en formo

de duobla poŝtkarto, kiu estas aĉetebla en la Akceptejo (prezo por unu peco 60 hal., por 100 pecoj 50 Kč), aŭ ĉe la administracio de la Progreso en Plzeň.

KANTO DE LA XIII.

dediĉita al ĉiuj glajraj pachtalantoj por solena rememorigo de XIII. Esperanta Kongreso en Praha, Aŭgusto 1921.

EM. BATEK, RIĜANY.

Slava melodio: »Hej, Slované!«

Kongresanoj, konsideru pri la nuna horo!
La Eŭropo Vin bonvenas nun en sia koro.
Tie vivas en korp' sana sento purigita,
[: sango ruĝa, labor' muĝa, spirit'
klarigita:].

Kongresanoj, en kunveno fortojn
ekzameni,
paciencie novan provon ni tuj entreprenu.
Veku fratojn, verda stelo jam
suprenleviĝas;
[:por la celo, sankta celo, jam homar'
vekiĝas:].

Regu amo, ne la glavo sangon soifanta!
Kompreniĝo kaj la paco regu esperanta.
Unu lingvo, ama leĝo, unu mondacio,
[:en konsento regu ĉiam, kiel unu Dio:].

ĈEĤOSLOVAKIO.

(Laŭ Dr. Stan. Nikola ŭ, kun aldono de plej novaj statistikaj datoj.)

Se la Ĉeĥoslovakoj kaj ilia lando estus lokitaj apud iu maro, ili estus internacie multe pli konataj ol ili estas nuntempe. Sed la Respubliko Ĉeĥoslovaka troviĝante direkte en la koro de l' Eŭropo, kuŝas tro malproksime de ambaŭ maroj, Adria kaj Norda. Kaj tiu mezeŭropa pozicio estas por la ŝtato tre maloportuna kaj rigardante al negranda amplekso de la respubliko, ne estas mirinde, ke la ĉeĥoslovaka nacio ne estas al vasta mondo multe konata — tiam pli, ke la malnova Viena registaro ĉiam penis malebligi al la Ĉeĥoj ĉiun nacian rilaton kun la mondo ekstera.

La Respubliko Ĉeĥoslovaka ampleksas 15.140.570 km² kaj laŭ la popolsomigo el la 15. februaro 1921 ĝi estas loĝata de 13.595.816 homoj, kiuj loĝas en 12.653 komunoj kaj en 1.933.776 domoj. La meza nombro de la loĝantaro sur unu km² estas 97 personoj. En la jaro 1910 la sama teritorio havis 13.596.601 da loĝantoj. La nombro de la loĝantaro malaltiĝis en Bohemio je 117.031 personoj (1.7%) dume en aliaj ĉeĥoslovakiaj landoj ĝi plialtiĝis jene: Moravio je 27.710 (1.1%), Silezio 14.495 (2.2%), Slovakio 66.655 (2.3%) kaj Subkarpata Rusio 7.386 (1.2%). Statistiko laŭnacia ne estas ankoraŭ preta.

La ĉefurbo Praha havas 676.476 loĝ. kaj 19.052 domojn. Sur unu km² loĝas tie ĉi 3888 personoj. La distrikto (ĵupa — elp.

ĵupa) de Praha havas 1,064.979 loĝ. Brno, la ĉefurbo de Moravio havas 221.422 loĝ. Opava, la ĉefurbo de Silezio 33.427 loĝ., Bratislava, la ĉefurbo de Slovakio 93.329 loĝ. kaj Uĝhorod, la ĉefurbo de la Subkarpata Rusio 20.213 loĝ.

Subkarpata Rusio havas propran aŭtonomion.

Per sia longeco Ĉeĥoslovakio egalas Anglion, Francion, Germanion kaj Italion. Sed ĵus tiu ĉi longeco estas malutila al la ŝtato — ĉefe en okazo de milito.

Per la meznombra populacio superas Ĉeĥoslovakio eĉ Francion, sed la loĝantaro ne estas egale dividita. Plej dense loĝata estas la industria parto de norda Bohemio kaj de Moravio, krom la ĉirkaŭaĵoj de Praha kaj de Brno. En la orienta Slovakio kaj en montaro de Subkarpata Rusio proksimiĝas la populacio al la Eŭropa minimumo.

Laŭnacie la loĝantaro de Ĉeĥoslovakio ne estas unueca. Politike la respubliko estas ŝtato nacia (t. e. la ŝtata lingvo estas ĉeĥoslovaka) sed rilate al alinaciaj minoritatoj, ĉefe la germana, ĝi estas ŝtato nacieca. Solvi la problemon, kiu principo estas pli grava, apartenas al malfacilaj problemoj de la ĉeĥoslovaka ŝtato. La kerno de la ŝtato estas Ĉeĥoslovakoj (preskaŭ 3/4), sed laŭdialekte ilia lingvo ŝanĝiĝas de okcidento al oriento. En Bohemio la dialektoj jam preskaŭ malaperis sed rimarkindaj ili estas jam en Moravio kaj ĉefe en Slovakio, kie eĉ la dialektoj oni uzas por lingvo literatura, kiujn tamen komprenas facile ĉiu Ĉeĥo el Bohemio.

Slava amo al la muziko kaj danco, kapablo lerni fremdajn lingvojn, negranda persistemo sed granda diligenteco estas la ĉefaj trajtoj de Ĉeĥoslovakoj. La senpera rilato kun Germanoj en la okcidenta Bohemio kaŭzis, ke la Ĉeĥoj estas tie ĉi pli rezistemaj kontraŭ la influo germana.

Da Germanoj vivas en la respubliko proksimume 2,500.000. Ili loĝas apud la landlimoj kaj interne de la lando en kelkaj insuloj, kiuj rapide malgrandiĝas. Sudoriente apud la landlimoj loĝas Magiaroj (aŭ Hungaroj?), preskaŭ 600.000.

Religio apartenas la plej granda parto de la loĝantaro al la eklezio rom-katolika (preskaŭ 11 milionoj) sed al oriento kreskas la nombro de protestantoj, ĉefe en Slovakio. En Bohemio rapide kreskas la nombro de personoj senreligiaj, kiuj batalas kontraŭ la moraleco religia per sia moraleco civitana kaj respublikana. La inteligentularo de Bohemio en la lasta tempo en granda nombro ekŝiĝis el la eklezio roma. Da Hebroj loĝas en la respubliko proksimume 370.000. En Subkarpata Rusio ili faras preskaŭ 14% de la

loĝantaro. Ili senĉese plinombrigas per alvenintoj el Polio.

Lau la klereco estas Ĉeĥoj la plej progresema nacio slava. Personoj ne sciantaj legi kaj skribi inter ili preskaŭ ne ekzistas. La samon oni povas diri ankaŭ pri la Germanoj en Ĉeĥoslovakio. Tamen en la okcidenta Ĉeĥoslovakio la klereco ne estas tro alta: en Slovakio estas 50% kaj en Subkarpata Rusio 75% de la loĝantoj ne sciantaj legi kaj skribi. Sed la nova registaro respublikana ĉiuforte klopodas forigi la bedaŭrindan staton kaj eĉ per gravaj punoj devigas la gepatrojn sendi la infanojn en lernejon.

La registaro ĉeĥoslovaka klopodas kompletigi kaj plimultigi la lernejojn ĉar sole per lernejo ĝi povas en la oriento plialtigi la klerecon de la popolo kaj vekii en ĝi la veran respublikanan spiriton. Al tio certe helpas ankaŭ la justa divido de la tero, apartenanta al la nobelaro. En Slovakio sole 2% da arbaraj kaj 6.2% da alia tero apartenas al kamparanoj.

La terkulturo en la respubliko multloke staras sur alta ŝtupo. La arbarkulturado ĉefe en Bobemio kaj Moravio estas eminenta, oni eksportas multe da ligno ĉefe en Germanion kaj Hungarion. El la kampaj produktaĵoj la plej grava estas la tritiko, kies rikolto tamen ne sufiĉas por la enlanda-bezono. Da ĝi oni devas importi 5 milionojn da q. Malpligrava manko estas ĉe la sekalo. Tiun mankon oni povas parte anstataŭi per eksporto de hordeo, kiu prilaborita kiel malto estas en la mondo same bone ŝatata kiel lupolo, plej bona el ĉirkaŭaĵo de Rakovník kaj Zatec (germ. Saaz). Ankaŭ la avenon oni povas eksporti. La plej grandajn surfacojn okupas la kulturado de la beto sur kiu bazas la plej grava industrio de la respubliko, la sukerfabrikado, kiu prezentas 18% de la tutmonda produktado. Tre grava estas ankaŭ la bierfarado, kiu ĉefe en Plzeň atingis mondfoman.

Sed pli ol sur la terkulturo, bonstato de la ŝtato bazas sur karba riĉeco kaj sur industrio. La respubliko Ĉeĥoslovaka estas la kvina inter la ŝtatoj, kie proporcie laŭ la nombro de la loĝantaro estas produktata plej granda kvanto da karbo.

La fera industrio sentas la mankon de la kruda materialo, ĉar ferminoj estas en la respubliko en kvanto ne sufiĉa. Maŝin-fabrikejoj sin trovas en la tuta respubliko. La plej grandaj estas en Praha kaj en Plzeň, kie ĉefe la uzinoj de Škoda estas mondfamaj. Por eksporto multe laboras la vitra industrio fabrikanta vitron, koralojn, perlojn ktp. Per tiu eksporto estas ĉefe Jablonec n. Nisou (germ. Gablonz a.

d. Nissa) mondkonata. Sur tre alta ŝtupo trogiĝas ankaŭ la teksa industrio, kiu prilaboras sole fremdlandan kotonon kaj lanon, kaj parte eĉ linon. Pro la drapindustrio estas ĉefe konataj Liberec (germ. Reichenberg), Brno, Humpolec, kaj Jihlava.

Manko de la ĉeĥoslovaka industrio estas nesufiĉa organizo de la fabrika laboro, kiu nur malrapide proksimiĝas al la organizado amerika. Alie la ĉeĥoslovaka laboristo estas are lerta kaj konceptema.

Ĉeĥoslovakio estas demokrata respubliko regata de prezidanto, kiun oni elektas por sep jaroj el la Nacia reprezentantaro, kiu konsistas el du kameroj; parlamento kaj senato. La deputitoj estas balotataj por sep jaroj de ĉiu ŝtatano (viro eĉ virino) kiu atingis 21 jarojn de sia aĝo. La senatanoj estas balotataj por ok jaroj de ŝtatanoj 25 jaraj. Deputitoj devas esti almenaŭ 30 jaraj, la senatanoj 45 jaraj. La prezidanto de la respubliko devas esti almenaŭ 35 jara. Ĉiuj ŝtatanoj havas la samajn rajtojn, ili apartenu al kiu ajn nacio, religio aŭ sekso. La gentajn kaj nobelajn titolojn oni ne permesas. La ŝtata lingvo estas ĉeĥoslovaka, sed en ĉiuj oficioj la ŝtatanoj povas uzi sian lingvon gepatran. La naciaj minoritoj havas siajn nacilingvajn lernejojn kaj oni garantias al ili plenan liberecon. La militista devo estas ĝenerala por ĉiuj viraj ŝtatanoj. Ĝi komencas per ilia 20 jaro kaj finas en 50 jaro. La militservado de la jaro 1927 daŭros 14 monatojn. Nun ĝi estas du jara.

Inter la eŭropaj ŝtatoj la Respubliko Ĉeĥoslovaka okupas lokon gravan, ne nur per sia loĝantaro, sed eĉ pro sia industrio. Pro sia klereco la loĝantaro povas konkuri kun ĉiu alia ŝtato. Tamen la civitanoj ne devas kaŝi al si eĉ kelkajn mankojn, kie la diverseco de la nacioj ne staras sur la lasta loko, ĉar neniu ŝtato havas tiom da alilingva loĝantaro kiel Ĉeĥoslovakio. Kaj fermi la okulojn antaŭ tiu ĉi fakto estus grava eraro.

Oni ankaŭ ne forgesu ke la ĉeĥoslovakoj revekiĝis el sia centjara katalepsio antaŭ ne longa tempo kaj tial ilia rilato al najbaroj estas sufiĉe malfacila. En sia evoluo ili ankoraŭ ne tenas firme en siaj manoj la industrian kapitalon, kiu estas ankoraŭ multloke posedata de fremduloj. Tamen oni ne povas dubi, ke Ĉeĥoslovakoj, same kiel liberigis sin de Habsburgoj, ili ankaŭ liberigos sin sur la kampo ekonomia.

El la nacio, kiu konsistis ĉefe el kamparanoj, laboristoj kaj oficistoj, kiu estis subpremata de la Viena registaro, devas fariĝi — kaj ni tion konfesu — fariĝas

nacio amanta sian ŝtaton, nacio oferema kaj justa al ĉiuj alilingvanoj.

B. Tittl.

MORAVIO KAJ SILEZIO.

(Moravio 22.300 km², 2.630.000 loĝ. — Silezio (kun Hlučín) 4.470 km², 660.000 loĝ.).

Al prahaj kongresontoj ni varme rekomendas la viziton de Moravio kaj Silezio, la ĉeĥoslovakaj provincoj, kuŝantaj inter la urboj Prahó, Krakovo kaj Vieno. Tra Moravio, nomita laŭ la ĉefa rivero fluanta en Danubon, iris jam en antikveco la konata komerca vojo el Polio suden. Moravio kaj Silezio etendiĝante inter la du ĉefaj landoj de la ĉeĥoslovaka respubliko: Bohemio (ĉefurbo Praha) kaj Slovakio (ĉefurbo Bratislava sur Danubo), peras inter ili. En Moravio kaj Silezio loĝas pli ol kvinono de la loĝantaro de la tuta respubliko, kiu entute havas 13.600.000 loĝantojn. Tri kvaronoj de ili estas ĉeĥoj, unu Germanoj.

Moravio estas tre karakteriza kaj ĉarma lando, preskaŭ egalante laŭ tiu ĉi vidpunkto Slovakion. Krom lokoj plenaj da historiaj monumentoj (kasteloj, ruinoj) tie alternas jen reviga valo aŭ ebenaĵo, jen gravaspekta montaro. Sed en Moravio konserviĝis ankaŭ antikva, pitoreska kaj riĉa nacia kostumo, multaj kutimoj kaj natura miraklo: la Moravia Karsto.

La lando staras antaŭ rapida evolucio kun siaj urboj, el kiuj multaj havas modelan lernejaron kaj riĉan industrion. Intensa scienca, politika, religia kaj societa vivo. Teatraj ludoj ĉiutage en kvar urboj: Brno, Olomouc, Moraská Ostrava kaj Jihlava (ĉeĥaj aŭ germanaj).

Vidindaĵoj: 1. La moravia ĉefurbo Brno (200.000 loĝ.) fama pro sia drapa industrio, estas sidejo de plej alta juĝejo en la respubliko (Supera regna juĝejo), de universitato, du politeknikoj, veterinara kaj agrikultura lernejoj, ĝi havas kelkajn belajn muzeojn (etnologia, naturscienca). Opero kaj dramoj estas ludataj en tri teatroj ĉiutage. Super la urbo leviĝas la kastelo sur Špilberk, kie dum aŭstria regado suferadis Silvio Pellico kaj la italaj »carbonari«. Oni ekskursas en arbaran ĉirkaŭaĵon aŭ en Karston. Rusoj kaj Francoj certe vizitis per vagonaro la batalejon de tri imperiestroj apud Slavkov (Austerlitz), kie staras bela monumento de paco.

2. Natursciencoj la plej interesa vidindaĵo en la centra Moravio estas la Moravia Karsto (Kras) devona kalkoŝtona regiono, diferencanta de la Karsto en Jugoslavio. Tie estas vizitindaj a) vera labirinto de fabelaj stalaktitaj grotoj en Sloup, facile alireblaj, elektre iluminataj, b) la subtera rivero Punkva, kiu perdiĝas kaj raeparas formante la-

getojn, c) la abismo Macocha, 137 m profunda, la mirego de tiu ĉi mondangulo, kiu kunigas tiom da kuriozaĵoj. Proksime (kaj en Brno) paleontologia muzeo de ostoj el pli juna diluvia epoko (muzeo Knies). La Karsto estas atingebla el stacidomoj Blansko aŭ Rájec sur la linio Brno-Praha.

3. Etnologian ekskurson tre rekomendindan vi entreprenos en sudan Moravion en la tiel nomatan moravian Slovakion (vinberkulturado). Sed necese estas alveni en tiun regionon dimanĉe matene, kiam la vilaĝanoj kunvenas al diservo surmetinte la riĉe broditajn multkolorajn festajn kostumojn. En labortagoj vi nenion vidus.

A) El stacidomo Břeclava ni veturu, sudorienten en Lanĵhot (fajraj kostumoj) aŭ okcidenten por vidi tri vilaĝojn de kroataj koloniistoj en Nova Prerava, Frelichov kaj Dobré Pole (stacidomo). Proksime fama angla parko apud la kastelo Lednice.

B) Vizitu la agrablan banlokon Luhačovice sub Blankaj Karpatoj en la sama regiono. De tie veturu en Uherské Hradiště kaj vizitu la pilgrimlokon Velehrad, aŭ el Strájnice (stacidomo) en Hroznová Lhota, kie loĝas la glora pentristo de slovaka gento Joja Úprka, al katolika vilaĝo Velká aŭ la protestanta Javorník, Ambaŭ kun belaj kostumoj estas iom malproksime de la fervojo. La Slovakoj, sangvina gento, kantas en sia belsona dialekto ĉarmajn naciajn kantojn, scias arte ornami la eksteron de siaj dometoj, delikate brodi per silko (en Slovakio per oro) kaj lerte pentri paskajn ovojn.

C) En proksima urba Hodonín (12.000 loĝ.) estas rimarkinda domo de moraviaj artistoj kun ekspoziciejo. En Uherský Brod naskiĝis la pedagogo kaj »instruisto de nacioj« Komenský (Comenius), episkopo de nobl-anima sekto de moraviaj fratoj de Unio, kiu mortis en ekzilo en Amsterdamo. Li jam en 1641 rifuzis akcepti latinan lingvon kiel internacian kaj rekomendis krei novan lingvon pli facilan ol ĉiuj.

4. La turistoj vizitas du montarojn. Norde en germanlingva Silezio Jeseniky kun la pinto Praděd (1490 m), atingebla el banloko Karlsbrunn aŭ eventuale el Gräfenberg, kie oni kuracas per malvarma akvo. La ĉefurbo de Silezio Opava (31.000 loĝ.) meritas viziton. Oriente de Brno en ĉeĥlingva regiono la montaro Beskydy kun la legenda monto Radhošť (1130 m) estas atingebla el stacidomo Frenštát. Supre sur la dorso de kiu, oni vidas vastan panoramon de Karpatoj kaj Tatroj, vi povas nokti en belaj vilaĝoj kaj hotelo en revivigita landa stilo. En ĉirkaŭaĵo loĝas Valaĥoj, paŝtista malriĉa gento, lingve kaj etnologie interesa.

5. La industriistojn eble interesigos la karba baseno de Moravská Ostrava,

kiu provizas grandan parton de meza Eŭropo. Grandega denseco de loĝantaro: 900 sur 1 km². Apude estas la urbo Vítkovice kun fandejoj, Kopřivnice kaj Studénka kun vagonfabrikoj. Jen ni estas jam inter gento de Laĥoj, proksime de la pola limo.

6. La agrokulturistoj vizitu la ebenajon Haná, kie loĝas la flegmatika gento (33.000), Olomouc (50.000) kaj Kroměříž. La unua urbo produktas agrikulturajn maŝinojn kaj vestaĵojn por eksporto. La antikva urbo de laboremaj Hanakoj en urboj Prostějov Olomouc ofte batalis je primeco kun Brno. En la ĉirkaŭo estas modelaj bienoj, kie riĉa vilaĝano bredas ĉevalojn kaj kulturas sur fruktodona humo tritikon, hordeon kaj sukerbeton.

Moravio donis al la ĉeĥa nacio la plej glorajn virojn: Komenský, Palacký kaj Masaryk. Tie naskiĝis aŭ vivas la mistika poeto Březina, la sociala bardo de ministoj Bezruč, la pentristo Úprka. La lando meritas la atenton de partoprenantoj de la dektria kongreso.

Skribis Rud. Friedrich, profesoro ĉe la gimnasio, Brno, Královo Pole.

ANTONI GRABOVSKI.

En la kongresan entuziasmon enfalis maldolĉa raporto: nia eminenta, malnova samideano, kiu kune kun dro. Zamenhof staris ĉe la lulilo de Esperanto, inĝ. Antoni Grabovski, direktoro de Esp. Akademio kaj aŭtoro de multaj esp. verkoj, mortis subite sur strato Marszalkowska en Warszawa. Grabovski, kiu studis la universitaton en Breslau (li naskiĝis la 11. jun. 1857 en Chelmo sur Vistulo) parolis kelkajn lingvojn, inter ili ankaŭ flue la ĉeĥan. La kormalsano, kiun delonge suferis inĝ. Grabovski senigis nin de unu el plej meritplenaj gvidantoj, kies nomo estas skribita en historio de nia movado per oraj literoj. Ripozu bone, kara kunfrato!

XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

en Praha 31. julio — 6. aŭgusto.

Atentigo.

Tuj post Via alveno al Praha iru en la Akceptejon, kiu troviĝas en stacidomo de Wilson, de lundo sur la insulo »Žofín«, kie Vi ricevos ĉiujn kongresdokumentojn (Kongreslibron, insignon k. a.) kaj adreson de Via loĝejo. Eventualaj ŝanĝoj kaj kompletigoj de la kongresa programo, estos anoncataj sur la nigra tabulo en la kongresejo de Žofín! Fremdlandaj kongresanoj nesciantaj ĉeĥe aŭ germane portu ĉiam kune precize skribitan adreson de Via loĝejo en Praha kaj de la kongresejo, kiun en okazo de vojerariĝo montru al policano. Promenante tra la urbo lasu Vin akompani de iu ĉeĥoslovaka samideano.

Oficiala programo:

Dimanĉe, 31. VII.: je la 10. en Reprezenta domo: Kunveno de Konstanta Kongresa Komitato. — Je la 11. en Reprezenta domo: Kunveno de Lingva komitato. — Je la 11. sur la insulo Žofín: Naciaj kunvenoj por elekti delegitojn al la Solena malferma kunveno. — Je la 14.30 en Reprezenta domo: Solena malferma kunsido. — Je la 20. h. sur Žofín: Interkonatiga amuza vespero.

Lunde 1. VIII.: Je la 9. h. sur Žofín: La unua kunsido de Universala Esperanto-Asocio. — Je la 14.30 h. sur Žofín: La unua kongresa laborkunsido. — Je la 20. h. en Reprezenta domo: Akademio de ĉeĥa muziko kaj kanto.

Marde, 2. VIII.: Je la 8.—12. h. en lernejo de Sta. Adalberto (»u svatého Vojtěcha«): Fakaj kunvenoj. — Je la 14 h.: Vizito de la Malnovurba Magistrata domo kaj de la kastelo. — Por fakuloj en la sama-tempo: Daŭrigo de la fakaj kunvenoj. — Je la 20. h. en Reprezenta domo: Internacia kostumbalo.

Merkrede, 3. VIII.: Je la 9. h. sur Žofín: La dua kongresa laborkunsido. — Je la 14.30 h. sur Žofín: La dua kunsido de UEA. — Je la 19. h. en la urba teatro de Král. Vinohrady: Teatra prezentado de »Nokto sur Karlštejn« (esperante).

Ĵaŭde, 4. VIII.: Ekskurso al Moravia Karsto per speciala rapidvagonaro.

Vendrede, 5. VIII.: Je la 9. h. sur Žofín: La tria kunsido de UEA. — Je la 14.30 sur Žofín: La tria kongresa laborkunsido. — Je la 20. h. sur Žofín: Internacia koncerto de blinduloj.

Sabate, 6. VIII.: Je la 9. h. sur Žofín: La ferma kongresa kunsido.

La kongresajn aranĝojn kaj laborkunsidojn povas partopreni sole la aliĝintoj al la kongreso kaj invititaj gastoj. Vespere la 31. VII. kaj 1. VIII. senpaga eniro por ĉiuj kongresanoj.

Loka Kongresa Komitato.

Fakaj kunvenoj.

Dum la kongreso okazos jenaj fakaj kunvenoj: De arkitektoj, Membroj de malgrandaj nacioj, Ruĝa Kruco, Katolikoj, Kristanoj, Kuracistoj, Castuloj, Komercestoj, Pacifistoj, Poŝtistoj, Psikistoj, kaj spiritualistoj, Kolektantoj, Skoltoj, Blinduloj, Socialistoj, Sportistoj, Studentoj, Framasonoj, Sakludantoj, Teozofoj, Instruistoj, Oficistoj, Sciencistoj, Vegetaranoj, Liberpensuloj, Fervojistoj, Virinoj, Hebreoj, Journalistoj kaj verkistoj. La horon kaj lokon de la kunvenoj vidu sur la nigra tabulo en la kongresdomo sur Žofín kaj en la lernejo de Sta. Adalberto (»u svatého Vojtěcha«).

Oficialaj delegitoj.

La kongreson partoprenos jenaj oficialaj delegitoj fremdlandaj: Por la Ligo de la nacioj: japana del. Nitobe, por Uruguaja registaro: so. Legendrand, por holanda min. de instruado: so. Sevenhuijsen, por belga min. de instruado: so. Fr. Schoofs, por hispana min. de la milito: so. Mangada-Rosenoern, por itala min. de marino: so. komandanto Alessio.

Honora komitato.

El la membroj de la honora komitato ni citas: ministroj Beneš (eksterlando), Husák (nacia defendo), Susta (instruado); Dr. Baxa, urbestro de Praha, deputito L. Pik, urbestro de Plzeň, Dr. Guth-Jarkovský, ceremonisto de prezid. Masaryk, Dr. Drtina, ŝtata sekretario en la min. de instruado k. a.

Kongresaj detaloj.

Ĉe la akademio la 1. VIII. kunlaboras: prof. Wiedermann (orgeno), Kantista societo de moraviaj instruistoj, Filharmonio de Šak, virtuozo de harpo so. Klička, koncerta kantistino fino. Šrédlová, Majstra trupo de Sokol (partoprenintoj de gimnastikistaj festoj en Lille), virina trupo de Sokol (prezentos ritmajn dancojn) kaj nacikostuma paro de sino. Szynglarská. — Aktoroj de la teatra prezentado (Nokto sur Karlštejn) estas: sino. Keyzlarová, fino. Hodíková, soj. Bunzl, Golykovič, Lukáš, Novák jun. kaj Šustr. — La ekskurson al Moravia Karsto aranĝas Ĉeĥoslovaka vojaĝa kaj transporta oficejo. La ekskurson gvidas: Esperantista Klubo en Brno, Fremdula asocio en Brno kaj la fama esploristo de Moravia Karsto prof. dro. Absolon.

Kongresaj konsiloj.

La fremdlandaj kongresanoj certe estas en embaraso, kiel rilatiĝi kun neesperantista publiko en Praha. Tial ni atentigas: granda parto de la ĉeĥa publiko parolas aŭ komprenas la germanan. Tial se Vi scias tiun lingvon ne hezitu ĝin uzi en okazo de la bezono. Ankaŭ la franca estas multe parolata de inteligentuloj, en restoracioj, hoteloj kaj komercejoj. Preskaŭ la samon oni povas diri pri la lingvo angla. Alie penu komprenigi Vin per kiu ajn lingvo. Ĉiu enloĝanto penos helpi Vin, ĉar eble en neniu alia lando estas la gastoj tiom ŝatataj kiel en Ĉeĥoslovakio, kie valoras la devizo »Gasto en domo — dio en domo«. Fremdlandanoj povas ornamu sin per trikoloroj aŭ flagetoj en la naciaj koloroj de sia nacio por tiel montri la diversecon de la kongresa partoprenantaro. La ĉeĥoslovakajn Germanojn eble ne estas necese peti, ke ili ne portu t. n. grandgermanajn trikolorojn, kies portado estas konsiderata kiel politika, kontraŭŝtata manifestacio kaj tial police malpermesita.

La kongresanoj propagandu Esperanton per sia serioza konduto. Ne kantu esperantajn kantojn sur la stratoj, ne parolotaku la publikon per propagandaj vortoj kaj ne ornamu Vin superflue per esperantaj steloj por ne aspekti kiel vivanta reklamkolono. Tiel Vi servus nur al la malamiko de nia movado, kiuj asertas, ke ni formas specon de savarmeo.

Estante en Ĉeĥoslovakio, penu akiri kiel eble plej grandan scion pri la enlanda vivo nacia kaj ekonomia por informi viajn naciojn pere de gazetoj pri viaj spertoj kaj travivaĵoj. Tiel Vi pruvos post Via reveno praktikan utilon de Esperanto. Tial vizitu kiel eble plej multajn urbojn ĉeĥoslovakajn, ĉefe tiujn, kiuj invitas al la vizito. Ili estas: Brno en Moravio, Bratislava (kie samtempe okazas la Orienta Foiro), Kutná Hora kun sia fama ostejo, on orienta Bohemio, Plzeň kun siaj mondfamaj bierfabrikoj kaj kanonfabriko kaj la el Plzeň facile atingeblaj kuracurboj Františkovy Lázně (germ. Franzensbad), Mariánské Lázně (germ. Marienbad), kaj Karlovy Vary (germ. Karlsbad). En Liberec (germ. Reichenberg) en la norda Bohemio okazas tre vizitinda Internacia Specimena Foiro, kies viziton ni ankaŭ varme rekomendas.

Ĉiokaze penu, ke la vizito de nia lando estu por Vi ne nur amuza, sed ankaŭ instrua! B. T.

Al la kongresanoj el Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo!

Ni atentigas, ke la partoprenontoj de la kongreso forveturos el Plzeň en du specialaj vagonoj al

donotaj al la vagonaro forveturanta el Plzeň je la 4.33 matene. Alveno al Praha je la 7.80. Kunveno de la forveturontoj je la kvara en la vestiblo de la ĉefa stacidomo. Aranĝanto estas la Laborista societo de Plzeň. Ornamu vin per rubando kun surskribo »Plzeň«, kiu estas ricevebla ĉe so. F. Kavan, Poděbradova tř. 6.

Kongresa statistiko

laŭ 12. Julio 1921.

Aliĝis samideanoj laŭ la jena tabelo:

Algerio	1	Italio	41
Argentino	4	Japanio	2
Aŭstralio	3	Jugoslavio	12
Aŭstrio	70	Kanado	3
Belgio	13	Litovio	2
Brazilio	1	Nederlando	70
Britio	68	Norvegio	12
Bulgario	30	Polio	62
Ĉeĥoslovakio	1186	Rumanio	9
Danio	45	Rusio	2
Danzig	4	Sudafriko	1
Estonio	1	Svedio	111
Finnlando	11	Svisio	34
Francio	83	Turkio	2
Germanio	239	Usono	4
Hispanio	25	Ukrainio	5
Hungario	40	Uruguajo	1
			2197

Lau la ĝis nun resenditaj aliĝiloj ni trovas jenajn profesiojn:

Instruistoj (Estroj) 135	Advokatoj	22
Profesoroj	35 Redaktoroj, jur.	14
Oficistoj	341 Artistoj	12
Labor. metiistoj	177 Pastroj	10
Komercistoj	118 Diversaj profesioj	144
Inĝenieroj	29 Studentoj	100
Kuracistoj	18 Sen difinita profesio	204
		1399

V. Cimr, oficisto de la L. K. K.

Kunvenoj de Kristianaj Esperantistoj dum la Kongreso. Dimanĉe la 31. de Julio je la 7.30 horo vespere: Protestantaj Esperanto-Diservo en proĝejo de »Jednota Ĉeskosobratrská« (»Unuigo de Bohemaj fratoj«). Praha II. — Soukenická ulice 15 (Stacio de tramvojo no: 3, 10, 11.) — **Mardo** la 2. de Aŭgusto je la 8. horo antaŭtagmeze. Ĝenerala Kunveno de »Kristana Esperantista Ligo« (K. E. L.) en societdomo de bohema K. U. J. V. (Křestanský spolek mladiků) (preĝejo de »Jednota Ĉeskosobratrská«.) Praha II. — Soukenická ul. 15. (Stacio de tramvojo no. 3, 10, 11.) Ĉiu Kristano, anoj de K. U. J. V. kaj Kristano Celado estas invitataj partopreni. Adreso de la loka aranĝanto: Benjamin Verner, dentisto, Proha VII., Štrossmajerovo náměstí 2.

Komercista kunveno. Dum la Kongreso okazos faka kunveno de la komercistoj, kunvokita de la IKR: Laŭ la ĝisnumaj informoj, la kunveno okazos mardon, antaŭtagmeze, la 2. aŭgusto. Detalojn oni legu en la Kongresa Gazeto, ĉiutage aperonta. Oni traktos pri la fondo de »Internacia Federacio de Komuna Komerca Lingvo«. —

Kelkaj konsiloj por la kongresanoj.

Laŭ la statistiko de la kongrespartoprenontoj oni povas diri ke la universala kongreso esperantista en Praha estos la plej granda kiu ĝis nun okazis. Jam oni transpasis numeron du mil du cent kaj ankoraŭ venas novaj kaj novaj aliĝintoj. Videble estas ke la arango de simila kongreso bezonas multajn kunhelpantojn kaj mi konsideras ke estas devo de ĉiu samideano helpi per ĉiuj fortoj al bona sukceso de la kongreso.

La kongresejo kaj akceptejo estos sur insulo Zofín, kaj tien devas sin direkti ĉiu samideano por ricevi kongresdokumentojn kaj adreson de sia hotelo aŭ privata loĝejo. Eble oni ankaŭ deforos en ĉiuj stacidomoj, kie estos starigataj specialaj informejoj.

Samtempe mi rekomendas al ĉiu samideano veni al Praha matene aŭ posttagmeze sed ne nokte ĉar tiam oni ne povos garantii al li la ĉambron (escepte se li ĝin pagos antaŭe).

Cehoslovakaj samideanoj kiuj ne povos partopreni la kongreson kaj loĝas apud la landlimo povus fari al eksterlandanoj gravajn kaj utilajn servojn atendante la alvenantajn eksterlandajn vagonarojn kaj helpante al kongresanoj aĉeti fervojbiletojn al Praha kaj en doganejoj kaj pasportaj aferoj.

Restas ankoraŭ por diri ion pri ĉeĥa lingvo: Oni legas ĉion fonetike kiel en esperanto akcentante iom la unuan silabon de la vorto: á — a, é — e, ó — o, ú — u, oni elparolas kiel esperante sed iom plilongigite kaj kun malforteta akcento, ĉ — ĉ, ž — ĵ, h — h, ch — h, š — ŝ, ř — rĵ, ě — ie, i — ji, ň — nj. Kiu postulos pli detalajn informojn koncerne la elparoladon k. t. p. de ĉeĥa lingvo, petu ilin de ĉeĥaj samideanoj. Postulante la fervojbileton diru: *druhá poloviční do Prahy* (duaklasa duonbileto t. e. 50% rabato, al Praha). *Třetí poloviční do Prahy* (triaklasa duonbileto al Praha). Kiu ne scias ĝin elparoli skribu ĝin sur papereton kaj prezentu al kasisto. Prosím — mi petas, prosím černou kávu — mi petas nigran kafon, prosím bílou kávu — mi petas kafon kun lakto, jedno pivo — unu bieron (oni donas kutime duon-litron), sklenici vody — glason da akvo, sodovku — soda akvon, vino — vinn, bílé — blankan, červené — ruĝan, mléko — lakton, čokoládu — ĉokoladon, čaj — teon, ovoce — fruktojn, housku — bulkon, rohlík — kraknon, chleba s máslem — panon kun butero, cukroví — sukeraĵojn, ano — jes, ne — ne, co to stojí — kiom ĝi kostas. Vegetarana manĝejo estas en strato Kon-

viktská. Trinkmono laŭ la cirkonstancoj. en grandaj hoteloj oni ĝin enkalkulas en la prezon de la ĉambro.

En kongresejo estos: monŝanĝejo, poŝtofocejo, informejo, loĝiga sekcio, pasportsekcio, babilejo, restoracio k. t. p.

V. C i m r, oficisto de L. K. K.

Kongresa bibliografio.

En la lastaj tagoj aperis du libroj, kiujn ĉiu kongresano nepre devas posedi: **Moravia Karsto, abismo Macoĥa kaj grotoj.** Eldonita de la »Esperantista Klubo« en Brno. Tiu ĉi libro verkita kaj tradukita laŭ la verkoj de la konata esploristo de Moravia Karsto Drc K. Absolon (tradukinto so. J. Blahoslav) traktas per alloga maniero pri la mirindaĵoj de tiu unika subtera regiono, kiun la kongresanoj vizitos jaŭde la 4. aŭg. La teksto estas kompletita per vico de belaj bildoj, inter kiuj la lasta granda tabelo prezentas la tutan profilo de subteraj koridoroj kaj grotoj. Paĝoj 44, 13×18 cm. La prezo ne montrita. — **Ĉeĥa literaturo laŭ la birdperspektivo.** Eldonita de fo. Barvič kaj Novotný en Brno. Jen eminenta kaj tre utila verko de Arne Novák prezentigas en bonega esperanta traduko de nia vigla samideano prof. inĝ. Vinc. Kroužil. Tiu ĉi libro per sia interesa maniero konatigas la leganton per la historio de la ĉeĥa literaturo de malnova ĝis la moderna tempo kaj mencias ĉiujn almenaŭ iom pli gravajn ĉeĥajn aŭtorojn kaj la karakteron de ilia literatura verkado. Paĝojn 58, 16×23 cm. Prezo 8 Kč. Ambaŭ libroj estos aĉeteblaj en la akceptejo. — Ni ne povas ne menci ankaŭ la elegantan arangon de ambaŭ libroj, kiuj per sia aranĝo, modernaj literoj kaj belaspekta kovrilo montras, ke la eldonistoj apartenas al la entreprenoj, kiuj aranĝas la aspekton de la libro laŭ artista vidpunkto.

So. Jiří Frankenberg, del. de UEA. en Bytčica ap. Žilina aperigis ĉe firmo O. Trávníček en Žilina serion da vere belegaj poŝtkartoj: Ruino de kastelo Strečno (du malsamaj bildoj), Ruino de kastelo Lietava, ruino de kastelo Likava, kastelo Orava kaj urbo Žilina. La bildoj estas tiom belaj, ke ni nur malofte vidis similajn. Tial ni varme rekomendas ilian aĉetadon al ĉiuj korespondemaj samideanoj, kiuj ŝatas arton. La teksto estas esperanta kaj slovaka. Dr. Silaba.

DIVERSAĴOJ.

Kio estas la »Ĉeĥoslovaka Gazeto«? Al la artikolo, kiu ni sub tiu ĉi titolo enpresis en la junia numero de nia gazeto, ni ricevis leteron de so. JUDr. Josef Čížek, advokato en Náchod, per kiu li postulas en la nomo de sia kliento so. Jaroslav Adámek, ŝatata komercisto en Červený Kostelec konstati, ke tiu ĉi sinjoro, kiu ankaŭ estas neesperantisto, havas tute nenion komuna kun la eldonado de »Ĉeĥoslovaka Gazeto«. Ni tion volente faras, eĉ sen la 19. presa paragrafo, kiu citas so. doktoro, kaj ni aldonas, ke nia raporto rilatis son. Oldřich Adámek el Červ. Kostelec, kiu nuntempe loĝas en Praha. Red.

Nestoro de ĉs. esperantistoj. sc. eksternejestro Em. Batěk el Říčany ap. Praha, nun 83-jara, ĝojigis nian redakcion per sia vizito kaj samtempe li alportis al ni la kongresan kanton, kiu ni enpresas en tiu ĉi numero. La estiminda sinjoro, al kiu la vido servas jam tre malbone, partoprenos ankaŭ la kongreson. Koran honvenon!

PLZEŇ.

Inter la urboj, kiuj invitas la kongresanojn

al postkongresa vizito estas ankaŭ la industria metropolo de okcidenta Bohemio, la »nigra urbo« Plzeň. La urbestro en sia kunveno la 25. jul. decidis sendi al la kongreso



NACIAJ KOSTUMOJ EL REGIONO DE PLZEŇ.



*SUPRE: LA MAGISTRATA DOMO.
MALSUPRE: LA BURĜA BIERFAREJO.*




specialan delegiton (soj. B. Tittl kaj J. Pech). La viziton aranĝas la Esp. Klubo de Plzeň jene: sabate la 6. aŭg. je la 8.02 h. per rapidvagonaro forveturo al Plzeň. Alveno je la 10.10 h. Vizito de la »Burĝa bierfarejo«, la plej granda bierejo Ĉeĥoslovaka, tie gastigo, poste komuna tagmanĝo. Posttagmeze vizito de historia Magistrata domo kaj de la Etnografia muzeo.

Vespere amika festvespero en la klubejo de Esp. Klubo. La vizitontoj de bohemiaj banlokoj povos eventuale forveturi al Frant. Lázně ankoraŭ la saman vesperon aŭ nokti en Plzeň. Detalajn informojn oni donos en la Akceptejo, kie oficos esper. el Plzeň. Tie aliĝu! — Jen ni prezentas kelkajn bildojn el Plzeň:

MALDEKSTRE: LA RREĜEJO DE STA. BARTOLOMEO.



SUPRE: LA URBA TEATRO.
MALSUPRE: LA RESTOJ DE FORTIKAJO.



MALDEKSTRE: LA FABRIKO DE ŠKODA.



La unua kongreso de blindaj esperantistoj okazos dum la kongressemajno. Dum la laborkursido oni pritraktos la fondon de esp. biblioteko por blinduloj kaj la sistemon de blindula stenografio. La kongreson prezidos prof. Th. Cart el Parizo.

Henri Barbuse, la konata franca verkisto, akceptis la honoran prezidantecon de la I. kongreso de »Liberiga Stelo«, Sennacia Asocio Tutmonda, kiu okazos en Praha 1., 2., 3. kaj 4. VIII. Tamen la kongreson li ne ĉeestos.

El Francio. Al la grava rezolucio, kium la Pariza komerca Ĉambro publikigis plenfavore al Esperanto, aliĝis ankaŭ la Komercaj Ĉambroj en Beauvais kaj Tarare.

El Germanio. En la oficiala »Foiru Gazeto« de Leipzig ni legas, ke, laŭ propono de la tiea Komerca Ĉambro, la konata »Leipzig'a Foiro« starigis specialan »Esperanto-Fakon«, kiu estas aneksigita al la ĝenerala »Komerca Fakto« de la foiro.

El Hispanio. La »Kataluna Esperantista Federacio« (en Barcelono, Carme 30) organizas ĉiujare »Internaciajn Florajn Ludojn«. Ili estas grava propaganda festo por Esperanto. Inter la konkursoj aranĝataj estas ankaŭ kelkaj, kiuj interesas nian legantaron. Inter la »eksterordinaraj temoj« ni trovas: XIV. — Premio de la »Union Gremial y Patronal« de Girona; 30 pesetoj. Temo: Grava utileco de Esperanto por la komerco. — XVIII. — Premio de la Komerca Ĉambro de Girona; 25 ptoj. Temo: laŭvola. — XIX. — Premio de Lia Moŝto la Provincestro de Girona; artobjekto. Temo: Esperanto kiel spirita rimedo por la solvo de la internaciaj konfliktoj. Interesuloj turnu sin al la supre donita adreso. Manuskriptojn oni ne plu akceptos post la 15. Aŭgusto.

El Aŭstralio. Aŭstralio »Komitato por Komuna Komerca Lingvo« estas fondita en Melbourne. Prezidanto estas sinj. H. V. Tillburg, sekretario sinj. A. R. Cohen, en Melbourne, Box 731 Elizabeth Str. P. O.

El Rusio. Peterburgo. De 1. ĝis 5. junio en Peterburgo okazis la Tutruslanda Esp. Konferencio. Alveturis 163 del. Laŭ nacioj estis: rusoj kaj judoj 126, latvoj 7, germanoj 6, ukrainoj 5, estoj 4, poloj 4, litovoj 2, hungaroj 1, belorusoj 1, finnoj 1, ŝvodoj 1, ĉuvaŝoj 1. Laŭ partioj: komunistoj 34, senpartiaj 117, soc.-universaljeroj 7, soc.-esperantistoj 1, anarkistoj 2. Inter ili estis: laboristoj 19 kaj inteligentuloj 144. Laŭ aĝo: plej maljuna 59 kaj plej juna 15. Plej maljuna estis el Bologoe sr. Mitropolski kaj plej juna peterburgano sr. Katalinov. Plej malnova esperantisto estis tre konata sro. Ŝčavinski. — La konferencio pasis de komenco ĝis fino tre skandale. Kaŭzojn de skandalo ni priskribos alifoje. Tre energie klopodis pri aranĝo de l' konferencio sroj. Čače, Devjatinin, Peto, Teterin kaj fino. Bikovskaja. Finita estis la konferencio per koncerto en la loĝejo de soc. Espero. Multe ridigis ĉeestantojn sro. Devjatinin per siaj esp. rakontoj. Grandan sukceson havis sro. Ŝebujev. Bele kantis esperantajn romanojn fino. Valentinova el urbo Herson. Ĉio estus sufiĉe bone, se ne estus malsato. Loĝantaro de nia urbo jam de kelkaj tagoj tute ne ricevas panon. Vetero estas tro varma por Peterburgo; en ombro 20 gradoj. Petroni.

Vizitu urbon Kutná Hora!

Inter postkongresaj ekskursoj estas en la programo por tago de 7./VIII. vizito de Kutná Hora, estinta reĝa minejurbo, monumento de mezepoka arto kaj de diligenta laboro, konstruita el riĉeco de minejoj kaj per klopodo de senlaca ministoj, mezepoka trezoro kaj monstampejo de bohemiaj reĝoj, glora batalcenejo, sidejo de parlamentoj kaj tre grava loko en la historio de la bohema nacio.

Ĉiu partoprenanto tie ĉi povas konvinkiĝi, ke la gravaj malnovaj dokumentoj (kasteloj, preĝejoj, baseno, domoj k. a. p.) de nia historia kulturo ekzistas ankaŭ ekster la ĉefa urbo.

Inter diversaj gotikaj kaj barokaj memorindaĵoj estas ankaŭ fama, tre interesa osteljo, la unua kuriozaĵo de tiu speco en la mondo.

Esperantista Klubo de Kutná Hora invitas vin sincere; bonvolu alveturi! Je revido!
Alois Horáček, prezidento.

Al ĉs. instruistoj!

En la lasta (5.) numero de la »Progreso« oni atentigis la personojn, kiuj volas kaj estas kapablaj instrui Esperanton en duagrada (meza) lernejoj, pri la ŝtataj ekzamenaj komisionoj en Praha kaj Brno. Estas dezirinde, ke ni havu kiel eble plej multajn tie ekzamenitajn instruistojn de Esperanto, kaj tial mi volas tie ĉi doni kelke da konsiloj koncerne la preparadon por tiu ekzameno.

La kandidatoj devas pravi, ke ili ne sole perfekte kaj detale scias la lingvon esperantan, sed ankaŭ, ke ili estas sufiĉe informitaj pri la esperanta literaturo, historio kaj pri la organizo de la propagando. La lingvon ili povas ellerni el kiu ajn gramatiko, ekzercaro, sintakso kaj vortaro, sed nepre ili devas ankaŭ koni la Fundamenton kaj Lingvajn respondojn de Zamenhof. El la literaturo devas ĉiu kandidato diligente tralegi Fundamentan kreŝtation de Zamenhof; krom tio estas rekomendindaj tiuj ĉi verkoj por legi:

1. Shakespeare: Hamleto, trad. Zamenhof.
2. Orzezska: Marta, trad. Zamenhof.
3. Kabe: Unua legolibro.
4. B. Prus: La Faraono, trad. Kabe.

Por ekkoni la historion de Esperanto uzu la kandidatoj broŝureton: »El la historio de Esperanto«, kiun eldonis Th. Čejka en Bystřice-Hostýn, aŭ »Deveno kaj historio de Esperanto«, kiun aperigis »Časopis českých Esperantistů«. Pri la organizo kaj propagando de Esperanto legu atente esperantajn gazetojn.

Fine »Literaturo de Esperanto« (katalogo de la librejo F. Topič, Praha, el jaro 1911) liveras tre riĉan resumon de esperantaj verkoj kaj »Časopis českých Esperantistů« 1910, paĝo 138 ĝis 140 nomaron de esperantaj gazetoj.

Josef Eiselt, ekzamenanto por Esperanto ĉe la ŝtata ekzamenaj komisionoj por elementaj kaj burĝaj lernejoj en Praha.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.